

RETKOMUNIKOJ 2009/2

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA sed ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonajn. Se vi tamen ne volas ricevi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO: 1. ĈI-SABATE INAŬGURITA LA DUA EKSPozICIO EN ESPERANTO-MUZEO SVITAVY 2. NOVAJ IDEOJ EN USONO ANKAŬ RILATE AL ESPERANTO 3. NOVA POLITIKA PARTIO EN ĈEĤIO PROKSIMA AL ESPERANTISTOJ 4. ĈEĤA-ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS 5. KALENDARO DE ESPERANTO-EVENTOJ EN CxEHxIO

1. ĈI-SABATE INAŬGURITA LA DUA EKSPozICIO EN ESPERANTO-MUZEO SVITAVY

Sabate, la 28-an de marto, oni inaŭguros jam la duan ekspozicion en la daŭra ekspoziciejo de la Esperanto-Muzeo en Svitavy. Ĝi havos ĉi-foje du partojn: la unua estos dediĉita al la kvardekjariĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la dua al la junulara Esperanto-movado en Ĉeĥio kun emfazo de la Internacia Junulara Kongreso en Liberec kun la temo Libereco. Komenco de la inaŭguro estos je 14-a horo. Dum ĝi estos prezentitaj (kaj je dispono por la partoprenantoj) trilingva faldfolio pri la Ottendorfer-biblioteko (la konstruaĵo, en kiu troviĝas la muzeo) kun mencio de la Esperanto-muzeo kaj kvin lingvaj versioj de speciala faldfolio pri la Esperanto-muzeo (CS, EO, EN, DE, RU).

Tiu ekspozicio daŭros denove ses monatojn, poste ĝin sekvos ekspozicio okaze de centjariĝo de Esperanto-movado inter fervojistoj, ene de kiu estos ikspoziciataj ankaŭ la plej belaj artaĵoj el la internacia infankonkurso pri la temo Fervojo. Info pri ĉio ĉi: dvor.libuse@seznam.cz

2. NOVAJ IDEOJ EN USONO ANKAŬ RILATE AL ESPERANTO

Inter novembro de 2008 kaj la 15-a de januaro 2009. dum la voĉdono organizita de la organizaĵo Change.org en la Unuiĝintaj Ŝtatoj, la propono de S-ro Oleg Izyumenko pri la lerneja instruado de Esperanto (el inter proksimume 8.000 aliaj proponoj!!!) atingis la 25-an lokon.

Surbaze de pli ol 900 alparoloj alvenintaj al tiu ĉi temo (el ĉiuj partoj de la Mondo!!!), la organizaĵo Change.org decidis plilongigi la funkciadon de la retejo

http://www.change.org/ideas/view/introduce_esperanto_as_a_foreign_language_subject_in_schools

por la homoj, kiuj subtenas la lernejan instruadon de Esperanto.

Oni povas do ankau estonte kadre de tiu ĉi retejo preparoli la ĉi-rilatajn proponojn/ideojn kaj alĝi al la pli ol 3.700 ĝisnunaj subtenantoj. Ankaŭ UEA - ekde la 10-a de januaro 2009 - apartenas al la partneraj organizajhoj de Change.org.

3. NOVA POLITIKA PARTIO EN ĈEĤIO PROKSIMA AL ESPERANTISTOJ

Sur la politika scenejo en Ĉeĥio ekestas nova politika partio kun la nomo Občanská strana (Civitana Partio), kiu estas iniciato de la civitana komunumo "e-lingvo" (www.elingvo.eu). Nun oni kolektas subskribojn por povi eniri la balotojn en Eŭropan Parlamenton. Pli da informoj troveblas ĉe www.obcanskastrana.info aŭ ĉe info@obcanskastrana.info <<mailto:info@obcanskastrana.info>>.

4. ĈEĤIA-ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS mi petas Marekon: EKAKTIVU RAPIDE KAJ SENDU BALDAŬ !!!

5. KALENDARO DE ESPERANTO-EVENTOJ EN ĈEĤIO

En la kalendaro estas envicigitaj nur la eventoj, kiuj okazos en Ĉeĥio, aŭ kiuj estas organizataj el Ĉeĥio. Eksterlandajn eventojn vi serĉu plej bone ĉe

<http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>

28.3.2009: Inaŭguro de nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo Svitavy. Info: dvor.libuse@seznam.cz

3.-5.4.2009: La 4-a Sabla Printempo en Písek (kunlabore kun E@I, praktika seminario "Esperanto kaj Interreto" por komencantoj kaj progresintoj). Info: esperanto.pisek@seznam.cz.

14.-19.4.2009: Printempa lingva seminario de AEH en la pensiono ESPERO en Skokovy. Info: nechvilep@seznam.cz

23.5.2009: Tradicia Infana Tago en Svitavy. Info: dvor.libuse@seznam.cz

23.-24.5. 2009: Renkontiĝo de IKUE - Katolika sekcio de ĈEA en Znojmo kaj Tasovice (kun esperantlingva Sankta Meso). Info: www.esperanto.cz/ikue aŭ m.svacek@seznam.cz

13.6.2009: Renkontiĝo en la regiono de la reĝo Ječmínek, kastelo Chropyně, info: tonda.krejcir@seznam.cz

13.6.2009: Muzea nokto en Svitavy. La konatan "Muzean nokton" (senpagan enireblon en muzeojn ĝis noktaj horoj) unuan fojon partoprenos ankaŭ ESperanto-Muzeo en Svitavy. Krom lokuloj estos je dispono al vizitantoj VP de ĈEA Petro Chrdle kaj ĈEJ-prezidanto Marek Blahuš. Info: Libuše Dvořáková <dvor.libuse@seznam.cz>

3.-5.7.2009: Internacia renkontiĝo omaĝe al la centa datreveno de la fondiĝo de Esperanto-klubo de doktoro Schulhof kun jarkunveno de AEH-IKEH en Pardubice. Info: aeh-ikeh@volny.cz

5.7.-18.7.2009, 19.7.-1.8.2009, 2.8.- 15.8.2009: tri etapoj de Somera Esperanto-Tendaro en Lančov. Info:

www.set-lancov.cz aŭ info@lancov.cz

18.-25.7.2009: 65-a Internacia Junulara Kongreso kun la temo "Libereco", Liberec, Inf.: ijk@esperanto.cz <http://ijk.esperanto.cz/>

25.7.-1.8.: Universala Esperanto-Kongreso en Bjalystok (PL). Informojn pri la buskaravano organizata de AEH (restas ankoraŭ kelkaj liberaj lokoj): josef-hron@volny.cz

22.-29.8.2009: EKOTUR - Tradicia internacia ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj. Svitavy, info: www.kava-pech.cz/ekotur aŭ chrdle@kava-pech.cz

9.-11.10.2009: Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Svitavy, kun inter alie gvidata vizito de Esperanto-Muzeo. Info: tomecek@esperanto.cz

12.-18.10.2009: InPaSem - Internacia Paroliga Semajno. Kurso por komencintoj kaj seminarioj por jamaj parolantoj. Dobřichovice. Info: www.kava-pech.cz/inpasem aŭ chrdle@kava-pech.cz

7.-14.11.2009: Terminologia Seminario en Dobřichovice pri ĝenerala terminologio kaj ĝia apliko al Esperanto sub la gvido de Jan Werner, (aŭtoro de la verkoj "Terminologia kurso" kaj "Terminologiaj konsideroj") kaj diskuto pri spertoj de la partoprenantoj en kreado de mankantaj terminoj dum verkado de fakaj tekstoj. Info: www.kava-pech.cz/terminologiaseminario chrdle@kava-pech.cz

12.12.2009 AnkRo (Antaŭkristnaska renkontiĝo) en Písek, ĉi-foje omaĝe al la 150iĝo de D-ro Zamenhof. Info: esperanto.pisek@seznam.cz

10.-25.7.2010: Flugkaravano al Kubo (UK en Havana kun turisma ekkona antauxkongreso). Info: chrdle@kava-pech.cz

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed vin mem kaj sendu la informojn al la redaktanto de ĈEA-retkomunikoj chrdle@kava-pech.cz